

## Societaj reprezentantoj renkontiĝis en Sisak

Aldonita de Josip Pleadin  
05/03/2013

La 2-an de marto 2013 en Sisak, invititaj de la tiea Esperanto-societo, renkontiĝis reprezentantoj de 6 kroatiaj Esperanto-societoj en sia dua kunveno, por diskuti la proponitajn ĉanĝojn de la Statuto de Kroata Esperanto-Ligo, sed ankaŭ por pritrakti multajn akumulitajn problemojn de la landa asocio. La kunvenon partoprenis Marija Jerkoviĉ (Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto - UPE, Zagreb), Nenad Margetiĉ (Bjelovara esperantista societo), Radenko Milojeviĉ (Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj - UZE), Josip Pleadin (Dokumenta Esperanto-Centro - DEC, ĀurĀ'evac), Zdenka Polaĉek (Bjelovara esperantista societo), Sreĉko Raduloviĉ (Esperanto-societo ĉe Sisak), Stjepan Āarina (Esperanto-societo "Mondo paca", Velika Gorica) kaj Anto Mlinar (prezidanto de Kontrolkomitato de Kroata Esperanto-Ligo el Zagrebo). La kunveno pasis en agrabla atmosfero, kvankam oni tuĝis ankaŭ malagrablajn temojn. La kunvenintoj konkludis:

1) Ili subtenas ĉiujn proponojn por ĉanĝi la Statuton de Kroata Esperanto-Ligo (KEL). De la Estraro de KEL ili postulas, ke ĉi kompilu proponon de ĉanĝoj kaj sendu ĉin al la asembleo por akcepto, sed ili postulas ke la Estraro preparu ankaŭ aldonan materialon eksplikante pro kio iujn ĉanĝoproponojn ĉi malakceptas, pri kio la asembleo ankaŭ rajtu diskuti kaj eventuale malakcepti la opinion de la Estraro.

2) Ili konfirmas la konkludon de la unua kunveno okazinta pasintjare en Bjelovar, kiu kontraŭas ofendojn. Ili invitas la membraron ne legi, ne disvastigi kaj ne respondi retmesaĝojn kun tia enhavo, kaj en kazo de sekvaj tiaj ekzemploj tuj kaj senpartie sankcii la uzantojn de tiaj rimedoj.

3) Ili invitas la Estraron, cele al plibonigo de la rilatoj, akcepti dialogon kun la parto de la membraro nekontenta pri la laboro de la Estraro. Ili invitas la Estraron mem organizi kunvenon dum kiu oni egalrajte kaj en demokrata tono, ĉuste tiel kiel dum la dua kunveno de societaj reprezentantoj en Sisak, diskutu pri la kurantaj problemoj kiuj malfaciligas la nuntempajn interrilatojn en la Ligo, kaj tiamaniere akiru la unuecon nepre bezonatan en la aktuala ekonomie malfacila tempo, aparte sojle de nia invito organizi Universalan Kongreson de Esperanto en Kroatio dum unu el sekvaj jaroj.

Kroatlingve:

Drugiĝo skup predstavnika esperantskih druĝtava Hrvatske, odrĝan u Sisku 2. oĝujka 2013. godine:Ā Ā Ā

1) podrĝava sve prijedloge za izmjene statuta, te od Upravnog vijeĉa Hrvatskog saveza za esperanto traĝi da saĉini prijedlog izmjena koje ĉe uputiti skupĝtini na usvajanje, ali traĝi da Upravno vijeĉe pripremi i dodatni materijal s obrazloĝenjima zaĝto se neki prijedlozi ne prihvaĉaju, a o kojem bi skupĝtina takoĉer imala pravo raspravljati i eventualno pobiti miĝljenja Upravnoga vijeĉa.Ā Ā Ā

2) potvrĉuje zakljuĉke prvoga skupa odrĝanog u Bjelovaru 2012. godine kojim se protivi vrijeĉanju te poziva ĉlanstvo da

elektroniĉku poŝtu uvredljivog karaktera ne ĉita, ne ĉiri i ne odgovar na nju, a da se kod narednih ovakvih sluĉajeva odmah i nepristrano sankcionira one koji se takvim sredstvima sluĉe. Ā Ā

3) poziva Upravno vijeće da u cilju poboljšanja odnosa prihvati dijalog s dijelom članstva koje je nezadovoljno radom Upravnog vijeća, da samo organizira skup na kojem bi se ravnopravno i u demokratskom tonu, upravo kako je to bilo na Drugom skupu predstavnika esperantskih društava Hrvatske, raspravilo o svim tekućim problemima koji opterećuju sadašnje odnose unutar Saveza te da se time postigne jedinstvo koje nam je prijeko potrebno u ovim teškim ekonomskim vremenima, a naročito na pragu podnošenja zahtjeva za organiziranje Svjetskog esperantskog kongresa u Hrvatskoj u jednoj od narednih godina.

Kompletan kroatlingvan protokolon de la kunveno vi povas legi ĉe: [http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com\\_remository&Itemid=11&func=select&id=8](http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com_remository&Itemid=11&func=select&id=8)

Post la kunveno okazis ankaŭ- jarkunveno de Esperanto-societo "Sisak", kiun la societaj reprezentantoj partoprenis kiel gastoj.